Bernd Hasecke,

En okcidento nun ruĝe

En okcidento nun ruĝe
Arda subiras la sun',
Baldaŭ leviĝos senmuĝe
Pala en brilo la lun'.

Kantis la birdoj laŭ sperto
Dum la somera lum-fest',
Dormas nun post la koncerto
Jam en kaŝita la nest'.

En la vesperaj aeroj
Ĉiu silentas viv-son',
Pri plenumotajj esperoj
Sonĝas la roza burĝon'.

Verkinto de tiu ĉi Esperanta poemo estas Bernd Hasecke *(∗1928-12.29 – †2008-02-05).*

Arg-1004-2030 (2014-05-05 11:37:33)

La poemo estas kantebla laŭ la melodio de la kanto "Seht, wie die Sonne dort sinket.. ". La teksto de tiu ĉi kanto legeblas en http://www.volksliederarchiv.de/text2814.html*. La melodio estas aŭdebla en* http://www.musicanet.org/robokopp/Lieder/susserdi.html *kaj en* http://www.youtube.com/watch?v=brapUYB5n20*. La muzik-notoj legeblas en* http://www.hymnary.org/text/seht_wie_die_sonne_dort_sinket*.*